

# Dulcis Iesu memoria

## Brevier-Himno

Malnova brevier-himno por la festo de la plej sankta nomo de Jesuo  
Hodiaŭ la 1a, 2a kaj 5a strofo apartenas al la brevier-himno por la  
6-a de aŭgusto, la festo de la transfiguriĝo de la Sinjoro > matena laŭdo.

*Dulcis Iesu memoria,  
dans vera cordi gaudia,  
sed super mel et omnia  
eius dulcis præsentia.*

*Nil canitur suavius,  
auditur nil iucundius,  
nil cogitatur dulcius  
quam Iesus Dei Filius.*

*Iesu spes pœnitentibus,  
quam pius es petentibus!  
Quam bonus te quærentibus!  
Sed quid invenientibus?*

*Nec lingua valet dicere,  
nec littera exprimere,  
expertus potest credere,  
quid sit Iesum diligere.*

*Iesu, dulcedo cordium,  
fons veri, lumen mentium,  
excedis omne gaudium  
et omne desiderium.*

*Sis, Iesu, nostrum gaudium,  
qui es futurus præmium,  
sit nostra in te gloria  
per cuncta semper sæcula.*

*Amen.*

Jesuo, Via rememor'  
feliĉon donas al la kor';  
sed estas la plej dolĉa ĝu',  
se restas Vi ĉe ni, Jesu'.

Aŭdiĝas ne pli milda son',  
kantiĝas ne pli gaja ton',  
ne plia estas ĝojgil'  
ol Vi, Jesuo, Dia Fil'.

Al voj-perdint' Vi estas gvid',  
sur Vin metiĝas ĉia fid',  
al la serĉant' Vi estas cel',  
por la trovinto bril-juvel'.

Esprimas ne parola fort',  
klarigas ne skribita vort' –  
spertint' nur venos al la sci',  
kiel ĝojigas am' al Vi.

Jesuo, nia kor-feliĉ',  
spirita lum', fontanta riĉ',  
supera Vi anim-dezir',  
la plej supera ĉarm-inspir'.

Sinjor', do estu nia ĝoj',  
premio post surtera voj',  
en Vi fondiĝu nia glori',  
nun kaj en eterneca hor'.

Amen.

latina T: 12-a jarcento

E: Guido Holz\*, 2009 en «Kantoj post ADORU», Espero  
Katolika 1-3/2009, n-ro 10